# Esperanto en Danio

13-a jarkolekto • n-ro 2 • majo 2006




Budo kun deĵorantoj en Aalborg

**Esperanto en Danio**
membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

**Adreso de la asocio/prezidanto:**
Ileana Schrøder
Vestavej 4, 2770 Kastrup
☎ 32 51 31 16
🖂 dea@esperanto.dk
Ĝirokonto: 805 7370
UEA-kodo: deaa-t

**Kromaj estraranoj:**
Ina Schultz (kasisto)
Jytte Sunekær (sekretario)
Ejnar Hjorth (vicprezidanto)
Bent Jensenius
Rasmus Høyrup Jensen
Jens S. Larsen

**Redakcia adreso:**
Jens S. Larsen
c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77
2770 Kastrup
☎ 24 47 50 40
🖂 eed@esperanto.dk

**Presado:**
Kjeld Steffensen, Malmö

**Adresŝanĝoj al:**
Ina Schultz
Bredagervej 21, 3.th., 2770 Kastrup
☎ 32 52 19 58.
🖂 ina.schultz@get2net.dk

**Represo de artikoloj el EeD estas permesata kun indiko de la fonto.**

**Limdato por la venonta numero: 01.08.2006**

# Enhavo

## Lande

**Jarraporto de DEA pri la agado dum 2005 ........ 3**
INFORMADO ........ 3
INSTRUADO ........ 6
REVU- KAJ LIBROSERVO ........ 7
ĈEFDELEGITA LABORO ........ 7
DANA ESPERANTO INSTITUTO ... 8
EKSTERAJ RILATOJ ........ 8
JARRAPORTOJ DE LA KLUBOJ ..... 8
EKSTERASOCIA APLIKADO ....... 13
**Kalkulaĵoj ........ 14**
**Gazet-eltondaĵoj ........ 16**

## Loke

**Kopenhago ........ 17**
**Næstved ........ 19**
**Århus ........ 20**

## Monde ........ 21

## Anoncoj ........ 22

# Lande

## Jarraporto de DEA pri la agado dum 2005

En 2005 nia membronombro ĝojige denove kreskis je pli ol 7% kompare al lastjare kiam la kresko estis 6%. Ni daŭrigis nian laboron en la tri agadkampoj: informado, instruado kaj utiligado.

Pri la agadkampo *informado* nia celo estis videbligi nin pere de aranĝoj kiel tiuj de la Kulturnokto, la Librofoiro kaj la Socia Forumo en Kopenhago, kaj la ekspozicio en Aalborg. Precipe pro du plej gravaj aranĝoj aperis gazetartikoloj kaj interviuoj en televido.

En la agadkampo *instruado*, kiel natura sinsekvo de informado, ni tre sukcese organizis kursojn por komencantoj kaj daŭrigantoj kaj fondis la danan sekcion de ILEI. Ni dankas ĉiujn membrojn kiuj kontribuas al nia prospero, kaj ni sendas apartan dankon al nia honora membro Ingrid Signore kiu surprizis nin per vere granda donaco de 50.000 kronoj al DEA omaĝe al sia patro, la renoma aktivulo kaj pioniro L. Friis kiu dum 40 jaroj gvidis la famajn somerferiajn kursojn en Helsingør.

### *Informado*

### Esperanto en Danio

La revuo aperis 4 fojojn. Ni daŭre ricevas subvencion de 2.353 kronoj pro la plialtiĝo de la sendokostoj fare de la registaro. Dum la jaro ni trovis novan eldoniston en Svedio, kaj tio kontribuas al malaltigo de la eldonaj kostoj. Ni klopodas daŭre por interesa kaj varia enhavo de la revuo.

### Informa materialo

Okaze de la librofoiro ni eldonis belan plurkoloran flugfolion, danke al la malavara donaco de Ingrid Signore, la filino de nia fama pioniro L. Friis. Estis presita kvanto da flugfolioj kiuj sufiĉas por disdonado ankaŭ dum la librofoiro en 2006, kie ni intencas partopreni denove.

## Radio, televido kaj gazetoj

Danke al nia kolektanto de gazeteltondaĵoj Grete Nielsen, ni daŭre sekvas la aperon de artikoloj en la gazetoj, pri kiuj oni cetere povas legi en nia revuo. Kelkaj el la plej ampleksaj dum 2005 estis:

- Aprilo: granda artikolo en *Weekend Avisen* sub titolo 'Hele verden lige på tungen'.
- Junio: artikolo de Peter Weide pri la trouzo de la angla lingvo
- Aŭgusto *Ugeposten Gilleleje,* intervjuo kun Birthe Trærup okaze de la traduko kaj eldono de la H.C. Andersen-libro *Bildlibro sen Bildoj*
- Septembro: en *Politiken* larĝa artikolo kaj intervjuo kun Kim Henriksen rilate malferman domon okaze de la Eŭropa Lingvotago.
- Oktobro, en *Politiken* kaj *Berlingske Tidende*: intervjuoj kun Sven Ziegler okaze de lia 70-jara naskiĝtago. En *DSB i dag* estis menciita kunveno kun prelego de Robert Phillipson.
- Decembro: *Jyllands-Posten:* 'Ord der forener'.
- Januaro: Stempel-info de *Post Danmark Frimærker* rilate 'Esperanto – et mellemfolkeligt sprog'.

Krome plurfoje Esperanto estis menciita en Næstved-gazetoj.

### *Radio kaj televido*

La 29-an de septembro en la kanalo P3 de la ŝtata radio la prezidanto de DEA estis intervjuita, kaj vespere en la Televido intervjuo kun Kim Henriksen kaj lia filo, kie oni montris malnovan elsendon kun la patrino de Kim Henriksen.

Dum la Librofoiro la prezidanto de DEA estis intervjuita de la universitata Radio Tekstur kaj de la televido Kanal København kune kun Robert Phillipson, kiu estis plurfoje elsendata.

La Radio-programo *Danmarksmester* elsendis en januaro Esperanto-paroladon de la SAT-kongreso en Århus 1947 demandante pri kiu lingvo temas.

### *Hejmpaĝo*

Ni daŭre klopodas plibonigi la paĝojn enhave kaj stile, kaj nia sperto estas ke precipe kiam ni cetere estas videblaj en aranĝoj, ni ricevas retmesaĝojn pri plia informado. Okaze de nia partopreno al diversaj aranĝoj ni konstatis ankaŭ la intereson

pri nia lingvo pere de la hejm-paĝo kaj la reto.

## *Esperanto-nyt*

Estis eldonita du fojojn en 2006. DEA rekomendis al Ejnar Hjorth eldoni la duan numeron por disdoni al la partoprenantoj de la librofoiro. Tie ni disdonis pli ol 200 ekzemplerojn al interesitoj. La saman numeron ni uzis dum la ekspozicio en Aalborg.

Danke al subteno de multaj legantoj, eblas daŭre sendi la revuon senkoste al politikistoj, ĵurnalistoj, gazetoj, gimnazioj kaj multaj aliaj. Ejnar Hjorth sendas ekstrajn ekzemplerojn al personoj kiuj sendas monon por subteni la revuon, por ke ili povu disdoni ĝin. Li ankaŭ havas kelkajn ekzemplerojn de malnovaj numeroj, kaj se iu deziras uzi ilin por informi pri Esperanto, li volonte sendos ilin al vi.

## *Partopreno en ekspozicioj*

Dum la jaro DEA partoprenis por la unua fojo kvar malsamajn aranĝojn:

- Dum la Kulturnokto nia estrarano Bent Jensenius aranĝis tre belan ekspozicion en "Huset" en centra Kopenhago. Ĝi estis granda sukceso, kaj pli ol 20 personoj anoncis sin al novaĵ-listo.
- La Kopenhaga Librofoiro okazis de la 18a ĝis la 20a de novembro, kun partopreno de pli ol 26.000 personoj. Por la unua fojo DEA aktive partoprenis kun tre bela kaj aktiva stando ekspoziciante librojn, revuojn, flugfoliojn, kaj eĉ malgrandan konkurson. Krom ekspozicio de libroj okazis multaj kulturaj aranĝoj kiel prezento de novaj libroj, renkontiĝoj kun aŭtoroj. Kadre de la aranĝoj DEA invitis Robert Phillipson prezenti sian libron "Ĉu nur-angla Europo?" kaj subskribi ĝin ĉe nia stando. Dum tri tagoj konstante deĵoris niaj esperantistaj membroj. Ili disdonis senpagajn faldfoliojn pri Esperanto al kelkaj centoj da interesitaj vizitantoj kaj invitis al Esperanto-kurso. Nia ĉeesto estis raportita en la radio kaj la televida programo 4 de Kopenhago intervjuis Robert Phillipson kaj Ileana Schrøder.
- Dana Socia Forumo estis la tria ekspozicio kie DEA partoprenis. Ĝi okazis de la 3-a ĝis la 5-a de februaro en

Kopenhago. Oni invitis ĉiujn danajn neregistarajn organizaĵojn kiuj laboras por la homaj rajtoj. Dum la tri tagoj okazis pli ol 100 atelieroj. DEA partoprenis kun tri atelieroj, en la kampo de lingvaj homaj rajtoj: "Lingvomortigo" prezentita de dr.phil. Tove Skutnabb-Kangas, "Ĉu la tutmondiĝo signifas ke la dana lingvo malaperos?" kaj "Lingvoj de elmigrintoj en Danio" prezentitaj de Robert Phillipson kunlabore kun Ole Stig Andersen, kiu reprezentis la danan UN-asocion. La ĉeestantoj estis treege interesitaj kaj faris multajn demandojn al la prelegantoj. DEA aranĝis ankaŭ standon kun enkonduka materialo kaj senpagaj flugfolioj. Ni spertis multe da pozitiva intereso, precipe de junaj aktivaj studentoj de lingvoj. Do, tre bona komenco por plua reprezentiĝo.

- Fine, de la 3.-5. de marto 2006 DEA kune kun la Nordjutlanda kubo partoprenis en "Krop-Sind-Ånd helsemessen" en Europahallen en Aalborg. Ankaŭ tie ni rimarkis viglan intereson.

Krome Benny Nielsen el Næstved ekspoziciis esperantaĵojn dum la nacia poŝtmarka ekspozicio Vejle Frim 2005: 'Esperanto bygger bro over sprogbarrieren', kaj KEK partoprenis en la Internacia Tago de Kopenhago (vidu la jarraporton de KEK).

## *Instruado*

Dum la lastaj jaroj ni planis fondi ILEI-sekcion, kaj ni sukcesis fari tion en januaro 2006, kiam la prezidanto de ILEI prof. Radojica Petrović estis invitita por gvidi pedagogian trejn-seminarion por danaj instruistoj kaj instruantoj. Dum la seminario 14 membroj de DEA kiuj okupiĝas aŭ interesiĝas pri instruado aliĝis al ILEI kaj decidis fondi danan sekcion de ILEI, kun Arne Casper kiel sekciestro.

Dum la 10 tagojn longa vizito de Radojica Petrović DEA organizis kursojn por daŭrigantoj kaj komencantoj, kaj ili ĉiuj vere larĝe profitis de la instrusperto de Radojica. En la kurso por daŭrigantoj partoprenis 12 personoj, kaj en porkomencanta kurso 10 personoj, kiuj nun daŭrigas la lernadon sub gvidado de Betty Chatterjee.

## Revu- kaj Libroservo

*Raportas Arne Casper*

2005 estis denove prospera jaro por la vendo de libroj kaj abono al revuoj. Kiel la antaŭaj jaroj la plej granda vendo koncentriĝis al lernolibroj – denove ĝojiga esprimo pri la fakto ke la nombro de membroj estas kreskanta. Parto de la akumulita gajno estos uzata en adekvataj aktivecoj kadre de libroekspozicioj.

La Revuservo havas konstantan abonantaron de precipe spertaj esperantistoj. Mi daŭre instigas novajn esperantistojn aboni kaj multe legi librojn kaj revuojn. Kiel aparte ĝojiga informo mi konstatis, ke Danio estis la lando, kie vendo de la tre bona revuo Ondo de Esperanto kreskis procente plej multe. La Ondo aperas 12 fojojn jare kaj en facila lingvo raportas pri la tutmonda agado sed enhavas ankaŭ literaturajn artikolojn.

Nia devizo estas: lernu - legu - aŭskŭltu - parolu!

## Ĉefdelegita laboro

*Raportas Arne Casper*

Post plurjara lerta agado Bent Winberg transdonis la ĉefdelegitan laboron al mi, la 1-an de julio 2005. La laboro ne sekvas la kalendaran jaron, sed komenciĝas la 1-an de julio kaj finiĝas la 30-an de junio. En 2005 ĉirkaŭ 2.000 kr. estis transdonitaj al DEA post la finkalkulo, kaj similan sumon mi antaŭvidas transdoni ĉi-jare.

La laboro estas tre intensa aŭtune kaj vintre, kaj la taskoj estas precipe:

- informi novajn esperantistojn pri la agado de UEA kaj tiamaniere krei bazon por novaj individuaj membroj;
- kolekti kotizojn de individuaj membroj;
- esti peranto al la Universala Kongreso de Esperanto.

En 2005 la nombro de danaj individuaj membroj de UEA estis 87, sed pro la kreskanta nombro de novaj membroj de DEA, tiu cifero estas ankaŭ kreskanta. Eble post nelonga tempo ni atingos la "magian" ciferon de 100 membroj.

Vi rajtas kompreneble demandi, kion UEA povas fari por vi, – sed vi ankaŭ povus elekti la kontraŭan demandon: kion mi povas fari por UEA kaj la Movado, ĉar ĉiu plia membro plifortigas nian Movadon!

## Dana Esperanto Instituto

*Raportas Lars Kromann*

En 2005 28 personoj mendis provlecionon kaj petis informojn. El ili 9 personoj komencis la kurson, kaj entute 4 personoj finis ĝin. Je la jarfino 15 personoj partoprenis la kursojn.

Tiuj rezultoj multe similas al la antaŭaj jaroj.

La kursanoj estas scivolemaj personoj kaj okazas konstante vigla korespondado inter ni (kaj aliaj malnovaj kursanoj) pri lingvaj kaj aliaj temoj.

Ni daŭrigas la laboron kaj havas 4 diversnivelajn kursojn kaj eldonas senpagajn kajerojn pri lingvaj temoj, ekzemple pri fonetiko, gramatiko kaj vortaretojn.

## Eksteraj rilatoj

Ni daŭre sekvas la laboron de la dana UN-Unuiĝo, kaj pro la ĉeesto en la Socia Forumo, ni interrilatis kun pluraj neregistaraj organizoj, interalie ankaŭ tiu de la Indiĝenaj Popoloj.

## DEJO

*Informas Rasmus Høyrup Jensen*

DEJO ne mem okazigis grandajn eventojn dum la pasinta jaro, tamen ni vidis multajn novulojn kiuj interesiĝas pri Esperanto. En Kopenhago okazis ĉiumonate DEJO-renkontiĝoj, kie ni interkonatiĝis kun kelkaj. Plie, DEJO helpis dum la librofoiro en Forum kaj en la foiro en Aalborg, kaj ankaŭ tie renkontis junulojn.

La grava celo de DEJO estas akiri pli da membroj. Ni jam renkontis plurajn novulojn kaj ŝatus aktivigi ilin en DEJO. Konservi la kontakton ofte problemas. Tiucele ni celas organizi kunvenon kun spertaj fortoj de TEJO.

Pri la strategio de DEJO: ni ankoraŭ uzas la spertojn de la lastjara gimnazia kampanjo. Ni ŝatus fari pli longedaŭrajn vizitojn al gimnazioj, kaj ni havas kelkajn kontaktojn en Kopenhago kaj Aalborg. Ni planas fari tion venontan aŭtunon, kiam la gimnazianoj havas pli da tempo.

## Jarraportoj de la kluboj

### Konversacia Esperanto-Klubo, Kopenhago

*Informas Jytte Sunekær kaj Kim Henriksen*

La membronombro estas 67, kiu dividiĝas jene: 57 aktivaj, 6 familiaj, 2 pasivaj kaj 2 honoraj. – La estraro kunvenis 7 fojojn.

– La dan-sveda laborgrupo kunvenis 2 fojojn: en Lund (12/3) kaj en Malmö (22/10). Nia organo *Kontaktilo* pere de PONTO aperis 5 fojojn. – Tuttaga paroliga kurso okazis en Malmö en kiu 3 el ni profitis.

Ĉiulunde ni kunvenas kun DEFA. Ni interkonsentas pri la aktivecoj kaj la surloka ekonomio. La DEFA-sponsorita retkafejo pro malaktiveco ĉesis. Ni havas komunan retadreson kiun ni malfermas antaŭ ol iri al la kunvenoj: defakek@hotmail.com .

KEK akiris agnoskon kiel **volontula popolkleriga asocio**, kaj ni havas la rajton peti publikajn lokalojn por niaj aktivecoj.

## *Instruado*

Vintra programo: kursoj por komencantoj kaj daŭrigantoj, legogrupo, studgrupo kaj grupeto, kiu interalie tradukas kantojn. Zita Garbaraviciené, Kim J. Henriksen, Regin Larsen, Arne Casper, Bent Wiinberg kaj Lene Niemann laborigas nin. La fervojistoj disponigas al ni la ĉambrojn por la celoj.

## *Programoj*

Jen kelkaj el la **programoj**, kiujn ni kune aranĝis:

- *Jan kaj Lene Niemann* rakontis pri vizito en la insularo *Svalbard* kie regas la polusaj ursoj.
- *Kim J. Henriksen* prelegis pri *moderna Esperanto-muziko.* El la unuaj grupoj kreiĝis novaj. Interesa historio, ilustrita per sonigoj – tiu parto de esperanta kulturo precipe furoras inter la junuloj.
- *H.C. Andersen* 200-jara: Birthe Trærup kontribuis per prezento de *Bildlibro sen bildoj.* Lars Kromann Jensen, kiu dum pluraj jaroj laboras pri tradukado de fabeloj kaj pri establo de hejmpaĝo pri tradukoj de HCA-fabeloj (www.chifonoj.dk), rakontis pri diversaj solvoj de problemaj vortoj. Pluraj el la aliaj tradukantoj spertis la malfacilecon en tiu projekto, kiu feliĉe realiĝis. Pri ĝia estiĝo, Henning Olsen povis raporti. Fine ni diskutis la temon.
- *Bjarke Nielsen* rakontis pri la *skolta esperanto-movado*, en kiu li iam aktivis. Ni vidis ekzemplojn el la organo de Skolta Esperanto-Ligo. Per sonbendo Bjarke prezentis ankaŭ diversajn kantojn rilatajn al skolta vivo, ĉiuj en Esperanto – kaj kelkajn li mem ludis/kantis.
- *Zita Garbaraviciené* rakontis pri la *Esperanto-movado en Litovio*, ŝia patrolando. Multaj

esperantistoj jam laboris por la baldaŭa kongreso. Zita komparis la litovan kaj la danan lingvojn.

- La *Loko-anoj, Olof kaj Daniel*, rakontis pri siaj projektoj, kiuj interalie inkluzivas kafejon kaj diversajn ekspoziciojn. Freŝa kaj novtipa maniero prezenti Esperanton al la publiko, kaj pluraj komunikiloj menciis la iniciaton.
- *Egon Starup-Jensen* rakontis *pri sia vivo*, kiu estis interesa kaj plena de travivaĵoj, pri sia renkonto al pacifisma movado kaj al Esperanto.
- *Somerekskurso*: Ni iris al Køge, kie ni vizitis la raran ekspozicion "Kjøge et-urbo", kiu daŭre progresas. Ni poste ĝuis restadon en la ĝardeno de Astrid kaj Erik, kiuj gasteme servis nin.
- *Jan Niemann* prelegis kaj montris lumbildojn de du pasintjaraj gravaj aranĝoj fervojaj: *Innotrans* en Berlino kaj *KAEST* apud Prago. La unua estis ekspozicio de la plej moderna fervoja materialo faritaj de diversaj firmaoj, kaj la dua estis konferenco pri apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko.
- Vizitis nin *Søren kaj Lars*, multjaraj amikoj de DEFA kaj aktivaj *blindaj* esperantistoj. Lars rakontis pri blindeco, ke fakte ne estas problemo NE VIDI – la problemo estas LA EFIKOJ en nia mondo, kiu estas konstruita por vidantoj. Ĉiam oni bezonas peti helpon de aliaj, sed fakte kelkfoje blinduloj povas helpi vin – provu! Søren raportis pri la Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj, kiu okazis en Vilno tuj post UK. Jytte akompanis lin.
- *Bent Jensenius* vizitis *Kolombion en la 1970-aj* jaroj, kaj li montris lumbildojn kaj rakontis verve kaj interese pri siaj travivaĵoj tie.
- Emerita ĉefbibliotikisto *Brita Olsson*, 85-jara, vigle kaj tre interese rakontis pri sia vivo, kiu estis plena de defioj, kiujn ŝi ĉiam alfrontis kaj plej ofte venkis.
- *Egon Starup-Jensen* en amuza maniero rakontis pri *matematiko, grekaj filozofoj*, paganaj dioj kaj la evoluo de la matematiko kaj ĝia signifo por la hodiaŭa mondbildo.

Grupeto festis la *honorigon* de **Bodil Kühlmann** en ŝia hejmo. Ŝi volonte aŭskultas pri la kluba vivo.

## *Kulturo*

**Internacia Tago de Kopenhago**: kune kun etnaj grupoj, kie ni disdonis flugfoliojn al la vizitantoj.

## *Reklamado*

(– afiŝoj, flugfolioj, gazetoj, televido, radio, retaj informoj).

**Infotago**, aranĝita de KEK, kiun vizitis 2 svedoj kaj 2 danoj. Kim gvidis la tagon kaj donis diversajn rimedojn kaj ideojn. La partoprenantoj bone aktiviĝis.

KEK starigis **novaĵleteron.** Ĝi estas rete sendata al 150 homoj.

Sezonkomence por la kursoj:

De la karnevalo ekzistis flugfolioj, kiujn "Kosmorama" sponsore disdonis al 70 kafejoj/kulturdomoj ktp. Ni produktis "deŝir-reklamafiŝetojn" por pendigi en superbazaroj, kulturdomoj, lernejoj ktp. Niaj membroj lerte pendigis ilin dise en Kopenhago.

KEK sendis 4 gazetarajn komunikojn la 20-an de septembro:

- Unu pri nia danlingva informgazeto pri esperanto.
- Unu pri nova hejmpaĝo pri danaj tradukoj de H.C. Andersen al Esperanto.
- Unu pri la tradukoj al Esperanto de la komiksoj Tinĉjo kaj Gastono.
- kaj unu pri la malferma tago (pro la eŭropa lingvotago...).

## Næstved

La pasintan jaron same kiel 2004 karakterizis tradukado de H.C. Andersen-fabeloj. Grave estas, ke Lars Kromann Jensen finis la laboron pri la hejmpaĝo Ĉifonoj. Tamen la klubo daŭrigas la traduklaboron, kiu donas utilan ekzercon.

Birthe Trærup eldonis en propra eldonejo "Bildlibro sen Bildoj".

Al la publiko en Næstved ni ofertis kelkajn danajn prelegojn:

- Ib Nielsen pri la fabrikoj en Køng
- Ole Pilegaard Hansen pri L.A. Ring-modeloj
- Jørgen Holm Hansen pri aŭtoveturado en Usono
- Ulla Møller kaj Allan Mogensen pri vojaĝtravivaĵo al Birmo.

Al preskaŭ ĉiuj aranĝoj venis gastoj, kvankam ni ne anoncas, sed antataŭe sendas gazetinformojn al lokaj komunikiloj. La DEA-kolekto de gazeteltondaĵoj montras tion. Antaŭ ĉiuj prelegoj ni kune manĝas dank'al Bente Christensen, kiu prizorgas tion.

Krom tiuj aranĝoj kaj ordinaraj klubkunvenoj, okazis ekspozicio de H.C. Andersen-libroj en la biblioteko de Sct. Jørgen, same kiel ni partoprenis en la novembra HCA-aranĝo de la centra biblioteko per voĉlegado de *La malbela anasido* fare de Birthe Trærup.

Fine de aŭgusto Næstved Oplysningsforbund invitis al malgranda "Sezonstarto" en Pejsestuen en la kazerno de Grønnegade – ni partoprenis per ekspozicio en nia najbara klubejo.

La somera ekskurso iris al Præstø, sunriĉa kaj bonega tago.

La poŝta reklamilo "Esperanto – et mellemfolkeligt sprog" funkciis dum 2005 kaj funkcios ĉi-jare en 4 diversaj poŝtaj centroj.

*Esperanto-Nyt* estis sendita 2-foje – en majo kaj decembro – al proksimume 80 adresoj, kaj surprize la lasta estis menciita taŭge kaj relative amplekse en ambaŭ semajnaj gazetoj.

Nia stoko de diversaj libroj trovis taŭgan lokon en la nacia biblioteko de Vilno, Litovio. Pluraj bonvolemaj semideanoj portis po porcion al la UK tie, poste ni sendis pliajn. La afrankon ni ŝarĝis al nia Librovenda Fonduso.

Komence de majo Birthe Trærup kaj Lars Kromann Jensen prelegis pri nia HCA-laboro en la kopenhagaj kluboj.

Nia novaĵletero aperis 4-foje, la estraro kunvenis 3-foje, nombro de aranĝoj estas 17 kaj meza nombro de partoprenintoj 8,8. La klubo havas 20 membrojn.

Dankon al ĉiuj, kiuj ebligis nian agadon.

*La estraro de EUN*
*Grete Nielsen, sekretario*

## Vejle-Fredericia

Kiel kutime ni havis jenajn aranĝojn:

La ĝenerala kunveno okazis en marto, kun komuna manĝado. La estraro estis reelektita.

En majo ni ekskursis, kaj la 5-an de decembro ni aranĝis Zamenhoffeston kun tradicia julemiko. Krome la estraro kunvenis plurfoje dum la jaro.

*Holger Jensen*

## Århus Esperanto-klubo

Esperanto-klubo de Århus havas nun 28 membrojn. Bedaŭrinde en 2005 mortis Anker Pedersen. Li estis multjara membro de la Esperanto-klubo en Odder. Post ĝia nuligo Anker Pedersen fariĝis nia klubano. Li ripozu en paco!

La klubo aktivas interne. Ni koncentriĝis je la laboro por niaj membroj, spertinte, ke diversaj eksteraj entreprenoj donis neniun rezulton. Niaj fortoj estas limigitaj, do ni ne povas disigi ilin je diversaj kampoj.

Ni havas tre konvenan, senpagan kunvenejon en Senior-Centret, meze de Århus, pri kio ni – kompreneble – estas tre kontentaj. En la jaro 2005 ni havis 9 klubajn kunvenojn kaj unu someran ekskurson. La temoj de niaj kunvenoj estis

diversaj. En januaro ni diskutis pri la cunamo, kiu terure atakis Azion fine de la 2004-a jaro. En februaro okazis nia Ĝenerala kunveno. En aprilo ni honoris la grandan danon – H.C. Andersen okaze de la 200-jara datreveno de lia naskiĝo. Ni havis ankaŭ gastprelegantojn, nome du tre aktivajn fervojistojn – Lene kaj Jan Niemann, kiuj rakontis pri la fora Vjetnamio. En majo Stanisław Mielczarek rakontis pri polaj sanatorioj.

En junio ni ekskursis al la bela regiono de Ry/Silkeborg. En la ekskurso partoprenis ankaŭ du gastoj el Hobro. Ni ŝipveturis al Himmelbjerget kaj poste ni vizitis du muzeojn – Ferskvandmuseet kaj Træskomuseet. Lacaj ni ĝuis bongustan torton kun kafo/teo en Rye Gammel Kro.

La 5-an de aŭgusto Dana Radio, programo 3, intervjuis Søren Dalmose. La intervjuo okazis en Skanderborg, kadre de Skanderborg Muzikfestivalo, kaj estis sendata rekte en la programo ”De sprøde Heste”.

En septembro ni rememorigis niajn feriajn travivaĵojn. En oktobro Mathias Dalmose lerte gvidis nin al Brazilo kaj “Bona Espero”. Estas agrable vidi junajn esperantistojn regi tiel bone Esperanton! Brave, Mathias kaj Jonas!

En novembro ni libere babilis Esperante kaj ankaŭ krokodilis. En decembro okazis la tradicia Zamenhof- kaj Kristnasko-vespero.

Koran dankon al vi ĉiuj – gastprelegantoj kaj membroj de Århus Esperantoforening, por la bona kunlaboro en la jaro 2005.

*Stanisław Mielczarek*

## Eksterasocia aplikado

La artista duo *La Loko* dum la tuta jaro aranĝis avangardajn projektojn:

- Dum 3 semajnoj en marto ili havis sian oficejon en la restoracio “Gefärlich”, kie ili unu vesperon prezentis proponon kio povus esti Esperanto-plado, samtempe informante pri Esperanto.
- Dum 5 semajnoj somere en Frederiksberg ili funkciigis la rapidmanĝejon OVO, kie oni povis aĉeti mole boligitajn ovojn kaj konsulti Esperanto-librojn. Raportis pri ĝi la regiona sveda televido.
- Ili produktis la unuan Esperantan sitkomon “Espero”. En ĝi agadas kvin profesiaj, sed ne-esperantistaj aktoroj. La filmado okazis antaŭ publiko 3/11, kadre de ekspozicio en Overgaden Instituto de Nuntempa Arto en Kopenhago. La dana ŝtata televido sekvis unu el la

aŭtorinoj kaj dissendis tion 15/1 2006.

*Esperanto Desperado* koncertis dum la pentekosta karnavalo, la 1-an de majo en Christiania, kaj en pluraj aliaj lokoj por granda ne-esperanta publiko. La grupo disiĝis ĉi-somere kaj formiĝis nova grupo Hotel Desperado. Pri ĝi oni povis legi duonpaĝan artikolon en Jyllands-Posten 7/12 2005. Vidu ankaŭ la hejmpaĝon www.hotelesperanto.dk.

La *Kulturgrupo* en Frederiksberg organizis dum 2005 sep prelegojn krom Zamenhofan vesperon en decembro.

# Kalkulaĵoj

**Regnskab 2005**
**Noll fonduso**

| *Indtægter* | *Kr.* | *Udgifter* | *Kr.* |
|---|---|---|---|
| 4% af DEAs individuaj | 207,60 | Gravsted | 712,95 |
| Renter | 3.408,00 | Tilskud | 2.109,00 |
| | | Kurstab | 1.669,92 |
| | | Årets resultat | -876,27 |
| I alt indtægter | 3.615,60 | I alt udgifter | 3.615,60 |

| *Aktiver* | *Kr.* | *Passiver* | |
|---|---|---|---|
| Obligationer | 57.617,92 | Egenkapital | 63.803,05 |
| Bank | 5.308,86 | Årets resultat | -876,27 |
| I alt | 62.926,78 | I alt | 62.926,78 |

I. Schrøder
Ileana Schrøder
Formand

Ina Schultz
Ina Schultz
Kasserer

Regnskabet er gennemgået og fundet i orden , 08.04.2006

Torben Svendsen
Torben Svendsen
Revisor

# DEAs regnskab 2005

| *Indtægter* | *Kr.* |
|---|---|
| Klubber kontingent | 12.090,00 |
| Individuaj | 5.190,00 |
| DEJO | 1.235,00 |
| Gaver | 53.279,30 |
| Renter | 5.109,38 |
| Libroservo overskud | 591,80 |
| I alt indtægter | 77.495,48 |

| *Udgifter* | *Kr.* |
|---|---|
| Administration | 913,75 |
| Porto | 45,00 |
| Gebyrer | 328,00 |
| UEA og EEUkontingent | 1.767,00 |
| Arrangementer | 32.708,00 |
| Årsmøde udgifter | -424,50 |
| E. en Danio | 14.664,25 |
| Repræsentation | 50,00 |
| Tilskud | 685,00 |
| Kurstab | 2.478,42 |
| 4% til Noll | 207,60 |
| I alt udgifter DEA | 53.422,52 |
| Overskud DEA | 23.481,16 |
| Overskud Libroservo | 591,80 |
| I alt udgifter | 77.495,48 |

| *Aktiver* | *Kr.* |
|---|---|
| Obligationer fore. | 85.513,92 |
| Libroservo | 42.201,54 |
| UEA kontoen | 1.050,92 |
| Kassekonto | 0,00 |
| Amagerbanken alm. | 8.682,22 |
| Girobank alm. | 38.865,49 |
| | 176.314,09 |

| *Passiver* | *Kr.* |
|---|---|
| Egenkapital primo | 150.262,13 |
| Årets overskud DEA | 23.481,16 |
| Årets overskud Libroservo | 591,80 |
| Egenkapital ultimo | 174.335,09 |
| Kreditorer | 1.979,00 |
| | 176.314,09 |

Ileana Schrøder
Formand

Ina Schultz
Kasserer

Regnskabet er gennemgået og fundet i orden. 08.04.2006

Torben Svendsen
Revisor

# Gazet-eltondaĵoj

*Januaro 2006*

19. Flensborg Avis , p. 19: “En særlig tone”. Recenzo de ‘Populærmusik fra Vittula’, romano de Mikael Niemi, en kiu Esperanto ludas ŝlosilan rolon.

*Februaro 2006*

7. Jyllands-Posten 6. sekcio, p. 12: “Esperanto jazz med Hugo Rasmussen”. Pri ĵazo kiel universala lingvo.
7. Lumbildprelego de Lene kaj Jan Niemann menciita en Berlingske Tidende kaj 2-loke en Næstved-medioj.
8. Dagbladet Holstebro-Struer *kaj* Lemvig Folkeblad, 1. sekcio, p. 7: “Esperanto på Café Utopia”. Lokaj muzikistoj nomas sin “Esperanto”.
10. Kristeligt Dagblad p. 11: “Alle vil leve længe - ingen vil være gammel”. Pri aktivaj emerituloj, interalie la Esperantoparolanto Agnete Lund Sørensen.
    Krucvortenigmo en *Hjemmet* kun la vorto Esperanto.

*Marto 2006*

23. JydskeVestkysten Kolding-Trekanten, sekcio “tæt på”, p. 3: nekrologo pri Kristense Amalie Kloster, forpasinta en la aĝo de 104(!) jaroj, siatempe lerninta Esperanton.
24. Information, p. 18-19 “Rytmernes esperanto”. Recenzo de dokumentaria filmo pri la ĵaz-perkutistino Marilyn Mazur.

*Aprilo 2006*

12. Weekendavisen, 4. sekcio “ideer”, p. 13: “qo'mey poSmoH Hol!”. Tutpaĝa artikolo pri planlingvoj.
26. Dagbladet Roskilde, 2. sekcio, p. 1: “Foredrag om det grænseløse sprog”. Anonco pri prelego de Ileana Schrøder.
29. Dagbladet Roskilde 29. april 2006, 2. sektion, side 8 *kaj* Dagbladet Køge 29. april 2006, 2. sektion: “Volapyk på biblioteket”. Anonco pri la klaŭno “Volapykmanden”. Mencias ankaŭ Esperanton kaj Idon.
    Krucvortenigmo en *Urban* kun la vorto Esperanto.

*Grete Nielsen / Infomedia*

# Loke

## Kopenhago

***KEK kaj DEFA Kopenhago.*** La unuan lundon de la monato ni kune vespermanĝas je 18.30 – kunportu mem viajn buterpanojn aŭ mendu ĉe Ruth, tel. 36 46 62 79, plej malfrue la vendredon antaŭe.

Kutimaj horoj:
Kursoj: 18.45 – 19.30 + 20.00 – 20.45
Legogrupo: 19.00 – 19.30 + 20.00 – 20.45
Kafo/teo-trinkado 19.30 – 20.00
Programoj 20.00 – 20.45 + 21.00 – 21.45

**Ni atentigas al ĉiuj, ke je 31/8 ni devos forlasi la klubejon en Vasbygade 10, kaj skribante ĉi tiujn liniojn ni ne scias, kio okazos post 1/9-2006 – ni petas al ĉiuj malfermi okulojn kaj orelojn por trovi solvon ...**

### *Instruado*

Kurso por komencantoj, kurso por daŭrigantoj kaj legogrupo daŭrigas sian laboron ĝisplue kun la instruantoj  Regin Larsen, Zita Garbaravicienė, Kim J. Henriksen kaj gvidanto de legogrupo Arne Casper.

La kondiĉo por partopreni kurson aŭ legogrupon estas membreco de unu el jenaj kluboj: KEK, DEFA Kopenhago, DEJO. Parolu kun la du kasistoj, Karen Olsen (DEFA) kaj Zita Garbaravicienė (KEK).

### *Okazos*

22/5 David-Emil Wickström estas etnomuziksciencisto nuntempe esploranta pri rusa populara muziko kiel doktoriĝa studento ĉe la universitato de Kopenhago. Li esperantistiĝis antaŭ 10 jaroj kaj aktivis/as ene de GEJ, JEFO, NJE kaj ĝuste nun en TEJO. Li prelegos pri TEJO kaj pri sia esperanto-agado.

29/5 Danoj, kiuj partoprenis la 58-an IFEF-kongreson en Shanghai kaj/aŭ la DEA-jarkunvenon en Malmö, rakontos.

5/6 Pro pentekosto neniu kunveno.

NB! **Ĉar 5/6 estas 'libera tago', 12/6 estas 'la unua lundo de junio', kaj ni kune vespermanĝos laŭ la kutimaj reguloj.**

12/6 Pri la 100-jara jubileo de Germana Esperanto-Asocio, pentekoston en Braunschweig, Jytte rakontos.

19/6 Gesinjoroj Zofia kaj Jerzy Fornal vizitos nin.
Zofia prelegos: 'El miaj historiaj esploroj kaj lukto kontraŭ pseudo-sciencaj "malkovroj"' kaj 'Aleksandro Silbernik en memoriam en la centa datreveno de lia forpaso.'
Jerzy prezentos: 'Wolfgangerl', okaze de la datrevena jaro de Mozart.

26/6 Somermeza aranĝo.

3/7 Ni somerstudos – por ne *tute* ferii de la studgrupoj ni traktos elektitajn ĉapitrojn de Faktoj kaj Fantazioj (M. Boulton).

SOMEREKSKURSO de KEK/DEFA ● Sabate 8/7 je horo 10-16. ● Pri preciza renkontiĝ-loko vi havos informon poste. ● Rezervu jam nun la daton kaj pasigu kelkajn agrablajn horojn kun amikoj.

10/7 Diversaj taskoj kaj enigmoj (Lene prezentos).

17/7 kaj 24/7: Programo ankoraŭ ne fiksita.

31/7 Karen distros per taskoj pri la naturo
Tradicia, somera programero, – tre amuza afero, kaj eĉ lerniga.

7/8 Somerstudado – vidu 3/7.

14/8 Pri la UK en Firenze. – Partoprenintoj rakontos pri unu el la plej grandaj eventoj de la jaro.

21/8 Rakontu pri esperantolibro legita.

28/8 Somerstudado – vidu 3/7

*Lene Niemann*

## *Okazis*

La biblioteko de KEK nun estas ĉe Betty Chatterjee en Vallensbæk. Ek de 2004 la plej belaspektaj libroj jam estas fordonitaj al RUC, rete prunteblaj. – La diversaj revuokolektoj + jarlibroj de UEA estas ĉe Jytte Sunekær en Værløse. Dank'al Gustav Kühlmann, kiu zorgeme kolektis ilin, ni havas bonan bazon por ion prezenti al nia 100-jara jubileo. Enhavlisto estas farita.

*Jytte Sunekær*

# Næstved

Sekretario: Grete Nielsen, Fyrrevænget 4, 4700 Næstved, tlf 5572 1240, rete atingebla pere de: eho-esperanto@stofanet.dk

## *Okazos*

Sabate 01.07: Somera ekskurso. Ni kolektiĝos je h 09.00 ĉe nia kunvenejo en Grønnegade. De tie ni en privataj aŭtomobiloj iros al la duoninsulo *Reersø* por tie vidi la interesan pejzaĝon kaj senvostajn katojn – poste ni iros al Dianalund, kie ni vizitos *Kunstnergården* por vidi la pentraĵojn de loka artisto. Inter tiuj du vizitoj ni manĝos ĉe Anna kaj Erik Hansen en ilia nova hejmo en Poppellunden 26 en Høng. Anna prezentos bonegan manĝaĵon por po 40 kr je persono. Trinkaĵoj aĉeteblas. Do, ĉi-jare **ne** kunportu lunĉon (krom – kompreneble – se vi ne deziras ĝui la gastamon kaj manĝaĵon de Anna!). Aliĝu ĉe Grete, tlf. 5572 1240.

Ni planas komenci la venontan kunvensezonon la 15an de septembro.

## *Okazis*

10.02: Ni finfaris la tradukon de *La semajnotagoj* de HCA + spektis filmon pri Bona Espero.

17.02: Ĝenerala kunveno de EUN kun manko de sensacioj, sed kun raporto pri bona aktiveco spite al negranda membronombro.

24.02: Danlingva prelego fare de Lene kaj Jan Niemann pri fervojaj tuneloj en la Alpoj. Ni ĝuis la belegajn fotojn de Jan, kiuj ofte ravis nin.

10.03: Lasta posttagmeza kunveno kun traktoj pri la estonto.

24.03: Ĉar ni ne sukcesis trovi taŭgan preleganton por la prognozita danlingva aranĝo, ni anstataŭe faris memorvesperon pri Poul Thorsen, kiu ja mortis en januaro. Lars kaj Henning rakontis. Samtempe estis speco de adiaŭa vespero al Hjørdis, kiu vendis sian bienon kaj transloĝiĝos al Kopenhago. Por honori ŝian antaŭ multaj jaroj forpasintan edzon, kiu estis la unua – kaj sola – prezidanto de nia klubo, ni spektis la televidan filmon *Den sidste bonde.*

07.04: Sezonfina aranĝo kun amuzo kaj ujutno.

# Århus

Prezidanto: Stanisław Mielczarek, Skovgårdsvænget 125, 8310 Tranbjerg J. – Tel./fakso: 86 29 23 06. Retpoŝto: stanislaw@ofir.dk.
Kunvenejo: Senior-Centret, Østergade 30, 2., 8000 Århus C.
Kunvenoj: lasta *(kun esceptoj)* ĵaŭdo de ĉiu monato je la 19:30 h.

## *Okazis*

23.02: Ĝenerala kunveno. Partoprenis ĝin 14 klubanoj, pri kio oni povas esti tre kontentaj. Je la komenco ni honorigis per 1-minuta silento la mortintan klubanon Anker Pedersen el Odder.
Ni ŝanĝis iom la statuton de nia klubo. Byrial Jensen ne deziris daŭrigi sian estraranecon. Jen la estraro de Aarhus Esperanto-klubo: Stanisław Mielczarek, Nikoline Fiora, Grethe Kvist, Luja Miletić kaj Søren Dalmose. La anstataŭanto restis Wolfgang Kirschstein.
Dum la kunveno oni esprimis deziron, ke ni parolu pli multe Esperanton dum la klubkunvenoj, ke ni igu la kunvenojn pli interesaj, i.a. invitante eksterajn esperantistojn.

30.03: Esperanto-kurseto – prepozicioj, kunmetitaj verboj. Wolfgang Kirschstein lerte instruis nin pri tiu temo. Bedaŭrinde ni estis nur 7 partoprenantoj.

27.04: Legu kaj ridu – ŝercoj, spritaĵoj kaj aliaj amuzaĵoj. Stanisław Mielczarek venis kun la libro „Miru, Pensu, Ridu“ de Paul Bennemann. Li igis nin legi kaj traduki amuzajn anekdotojn. La 5 klubanoj (nur!), kiuj venis al la kunveno havis bonan okazon rideti kaj amuziĝi.

## *Okazos*

18.05: Ĉu la angla fariĝas la internacia lingvo?

**03.06**: Somera ekskurso. La celo de la ĉi-jara somera ekskurso estos Fredericia. Nia gvidanto tie estos Nikoline Fiora, kiu iam loĝis en tiu bela urbo. Kiel kutime ni kolektiĝos je la parkumejo ĉe Daugbjergvej, vid-al-vide de Silvan Bygge Marked je la 9:45 h. Partoprenontoj bonvolu enskribiĝi telefonante antaŭ **la 28-a de majo** al: Stanisław Mielczarek, tel.: 86 29 23 06.

**AGRABLAN SOMERAN FERION!**

# Monde

● Ĉe nia redaktofino, la reta Esperanto-televido ITV (internacia.tv) paŭzas pro manko de kapitalo. Intertempe oni povas ĝui kelkajn filmetojn ĉe farbskatol.net, fondita de la junaj francoj Axel Rousseau kaj Emmanuelle Richard. Ĉi tiu retejo estas malpli ambicia, pli fleksebla kaj, laŭ la iniciatintoj mem, malpli fripona entrepreno ol ITV.

● Ankaŭ aperas de tempo al tempo novaj sonmaterialoj en la reto. La junulara grupo “Varsovia Vento” faris kelkajn kaj metis ilin ĉe http://www.republika.pl/viavento/aktuale/sonmaterialoj.htm. La plej kompleta superrigardo de Esperantaj ret-radioj ŝajnas esti la jena en Japanio: http://www.bongo.ne.jp/~teg/radio/esperanto.htm.

● Reza Torabi, iranano loĝanta en Tajvano, ofte skribas en la Esperanta novaĵ-servo raporto.info, fondita de panamano, pri la aktualaj tumultaj okazaĵoj en Nepalo. En aprilo kvar poloj, el kiuj Marzena Staniszewska kaj Wojciech Mysiara estas esperantistoj, implikiĝis en tiuj okazaĵoj. Ili estis pluvojaĝantaj post partopreno en la Sesa Himalaja Renkontiĝo, kiam armitaj maŭistaj ribelantoj kaptis ilin kaj retenis ilin dum unu tago ĝis ili pagis por sia liberiĝo. La incidento, nature, kaŭzis grandan reeĥon en la pola gazetaro.

● En Rusio grandan reeĥon kaŭzis la fikcia filmo “Casarosa”, kies medio estas la rusa Esperanto-movado de la 1920-aj jaroj. Ĝi estis montrita en tutlanda televido, tuj post la vespera novaĵ-programo.

● Malpli da atento ricevis la 15-taga aresto de Źmicier Łapcionak, konata belorusa Esperanto-aktivulo. Li partoprenis la protestajn manifestaciojn en Minsk kontraŭ la balotoj en aprilo.

● Komence de aprilo la prezidanto de UEA ĉeestis la fondon de “Azia Centro por Disvastigado, Instruado kaj Esplorado de Esperanto” ĉe la Politeknika Universitato en Honkongo. La laboro de la centro temos ne nur pri Esperanto, sed ankaŭ pri instruado de la angla kaj ĉina lingvoj.

○ Ĝemo de la redaktoro: Mi ŝatus aldoni ion pri la lastatempa evoluo en Aŭstralio kaj Afriko, sed mankas spaco!

# Anoncoj

## *La frakseno Igdrasilo*

ANTIKVA DIA HISTORIO




**La frakseno Igdrasilo** estas la mondarbo en la antikva sagao de la nordiaj popoloj. Ĉi tiu libro temas pri la vivo de la dioj en la mond-arbo dum multaj jar-miloj ĝis la tago, kiam la aĝa arbego falos pro la ŝtormoj, kiuj blovegos je la finiĝo de la mondo.
"La frakseno Igdrasilo" rerakontas la antikvajn legendojn de Edda en amuza, pensiga kaj instrua maniero. Ĝi estas ĝuebla por legantoj inter 9 kaj 99 jaroj, ankaŭ taŭga por komencantoj.

La sveda verkisto **Alf Henrikson** (1905-1995) estas precipe konata pro siaj popularhistoriaj verkoj, skribitaj kun subtila humuro kaj granda faka sperto. Li verkis ankaŭ lirikon kaj vojaĝpriskribojn.

---

*Havebla ĉe via*
*Revu- kaj Libroservo de DEA*

Tel. 3920 6348 & 2140 8487
arnecasper@dbmail.dk

*lernu! legu! aŭskultu! parolu!*

---

## *Kvar el niaj junaj esperantistoj geedziĝis en la somero 2005.*

Brian Laustsen, basisto de la eksa muzikista grupo Esperanto Desperado edziĝis al Paola Grippo en Italio la 3-an de julio. Ili renkontiĝis en Internacia Seminario antaŭ 5 jaroj kaj nun loĝas en Kopenhago.



Dekstre en la bildo vi vidas Preben Joost, kiu estis atestanto kaj por Paola/Brian kaj por Jacob Nordfalk kaj Annemette Jensen (ĉi-maldekstre) ĉe ilia geedziĝo la 16-an de julio.

**Gratulon al ambaŭ geparoj!**



*Sur la genuo de Jacob sidas ilia filo Asger, kiu estas la nuna plej juna esperantisto en Danio.*



# *Korpo, animo kaj spirito*

*La frontpaĝa bildo estas el la foiro "Krop Sind Ånd" en Aalborg en marto. Sur la foto, farita de la prezidanto de Esperanto-Asocio de Norda Jutlando Ejnar Hjorth, videblas Karin Jørgensen, Finn Østerbæk, Kamma Tranum, Ileana Schrøder kaj Arne Casper.*




*Deĵoris foje la DEA-prezidanto kaj la UEA-ĉefdelegito…*

*… kaj alifoje reprezentantoj de la loka esperantistaro, jen Karina Bredelle.*

